

Kálmán Kalocsay
kaj la unua Kultura Semajnfino Esperantista en Renens apud Lausanne
Claude Gacond, 421-a radioprelego, 1971.11.03 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Kálmán Kalocsay, nia granda poeto, kiu ĵus festis sian okdekan jariĝon, en artikolo aperinta en *Hungara Vivo*, 1971, numero 3-a, rimarkigas, ke « *unu el la gravaj kaŭzoj de la plorinda malalteco de la libro-vendado estas, ke la nivelo de la lingvoscio inter la esperantistoj estas malalta.* »

Cl.- Kalocsay opinias, ke « *parte la lingvo-instruistoj kulpas pri tio : ili tiom emfazas la eksterordinaran facilecon de la lingvo, ke iliaj lernantoj kredas, ke per kurso ili jam lernis ĝin perfekte, kaj kiam ili, komencante legi, ne komprenas ion, ili seniluziiĝas kaj dizertas.* »

A.- Kalocsay konkludas dirante, ke « *la plej grava tasko estas, kiel Kabe diris siatempe, ke la esperantistoj lernu Esperanton.* » Kaj li donas plej diversajn rimedojn, kiujn devus mediti ĉiuj, kiuj havas funkcion en la esperanto-movado.

Cl.- En Svislando estis kreita antaŭ tri jaroj Kultura Centro Esperantista, ĝuste por alporti novan klimaton en la esperanto-vivo. Iu parto de la esperantistaro tuj vigle kaj malavare subtenis tiun Centron, tiel ke ni povis forlasi nian instruistan profesion, por nin dediĉi cent-pro-cente al la poresperanta laboro. Kiel vi povas imagi, nia esperanto-kronikado ĉe Svisa Radio ne garantias kompletan salajradon.

A.- Ni devis unue garantii la racian organizadon de fundamentaj kaj elementaj servoj, sen kiuj ne estas eble progresigi esperanton. Ni ekzemple devis reorganizi la libro-servon, por ke estu eble aĉeti librojn ne nur tra la kanalo de pli-malpli sekreta libro-servo, sed ankaŭ per la kanalo de la 400 libro-vendejoj, kiuj ekzistas en Svislando.

Cl.- Ni devis organizi korektan servon, kiu permesas al la esperanto-ĝelernantoj, kiel al la progresantoj, kaj kial ne, al la lertaj esperantistoj, submeti siajn taskojn, leterojn, verkojn al kompetentaj korektistoj.

A.- Ni devis pretigi instrumaterialon, kiu permesas alporti iomete pli freŝan aeron en la esperanto-kursojn, kaj poste estis necese ekorganizi stud-seminariojn por la esperanto-instruantoj. Jam du tiaj seminarioj disvolviĝis : unu pri la perdialoga instruado, alia pri la aŭd-vida instruado. Tiu lasta seminario ĵus disvolviĝis la lastan semajnfino de oktobro en Bazelo, kaj alian fojon ni raportos pri ĝi iomete detale, aŭdigante samtempe registraĵon, kiu donos al vi kontakton kun dekjaraj ĝelernantoj, kiuj ritmikas.

Cl.- Komence de la sama monato oktobro, tio je la sabato 2-a kaj dimanĉo 3-a, okazis en Lausanne kun grandega sukceso tre grava manifestacio. Temas pri la unua Kultura Semajnfino Esperantista, kiun organizis nia Kultura Centro. Partoprenis tiun manifestacion cento da geesperantistoj. La plej juna estis 5-jara kaj la plej maljuna 84-jara. Por la unua fojo la gepatroj povis senzorge veni kun siaj gefiloj, ĉar pri la infanoj vartis 3 infanĝardenistinoj kaj du edukistoj.

A.- Por organizi tiun Kulturan Semajnfino ni povis kalkuli je la helpo de 15 kunlaborantoj, inter kiuj tri prelegistoj : Henri Vatré el Ĝenevo, Claude Piron el Coppet kaj Klaŭdo Trésorier el Besançon, Francio. Nin helpis por la instruado Lucienne Dovat el Renens.

Cl.- Ĝuste en tiu urbeto Renens apud Lausanne disvolviĝis nia Semajnfino. Ni povis lui idealan kongresejon kun salonego povanta ricevi 300 personojn kaj kun klasejoj, kie povis samtempe disvolviĝi la diversaj programoj. Tute proksime troviĝis komforta sed tre malmultekosta amas-hotelo.

Kálmán Kalocsay
kaj la unua Kultura Semajnfino Esperantista en Renens apud Lausanne
Claude Gacond, 421-a radioprelego, 1971.11.03 & 06

A.- Ni solvis la manĝproblemojn tiel : Kuiristo pretigis supon kaj teon, kaj la partoprenantoj alportis siajn manĝaĵojn. Tio mallongigis la manĝperiodojn kaj permesis al ĉiu partoprenanto elspezi plej malmultekoste por replenigi sian stomakon. Bufedo permesis akiri plej diversajn trinkaĵojn je tre modera prezo.

Cl.- Ni dividis la partoprenantojn en kvin grupojn. La grupo A kunigis la esperantistojn. Jen kelkaj programeroj de tiu grupo A : Ronda tablo pri esperanto kaj ĉio, kio estas en rilato kun la lingvo internacia ; prelego pri lingvistiko ; alia prelego pri la temo : antaŭjuĝoj ; alia prelego aŭ vera kurso pri la budapeŝta skolo *Literatura Mondo*. Entute estis 8 studhoroj, kiuj entuziasmigis la partoprenantojn.

A.- La grupo B kunigis la komencantojn. El ilia programo ni mencias : studado, aŭd-vida prelego pri la temo *vivo en hinda vilaĝo*, prelego pri la temo *evidentaj lingvaj eraroj*, prelego pri la temo *tradukoj de kantoj* kaj ronda tablo. Ankaŭ 8 entuziasmigaj studhoroj.

Cl.- La grupo C kunigis la personojn, kiuj venis por havi kontakton kun la esperanto-movado. La prelegoj okazis en la franca lingvo, ĉar Renens situas en la franca parto de Svislando. Iliaj temoj estis : *unua kontakto kun esperanto* ; *esperanto en tri monatoj* ; *ronda tablo*. En la tri programitaj lecionoj la gelernantoj konatiĝis kun la vortfarado kaj frazkonstruo propra al esperanto. Ankaŭ entuziasmiga okleciona programo.

A.- La grupo D grupigis la geknabojn kaj la grupo E la infanetojn. Ankaŭ ambaŭ grupoj havis apartan programon, kiel ni jam diris, gvidataj de kompetentaj personoj. La infanetoj havis aŭd-vidan rakonton, kaj ili konstruis korbeton el ĵurnala papero ; la geknaboj ludis kaj promenis kaj partoprenis iujn studhorojn adaptitajn al ilia lingvo-kapablo.

Cl.- Ekorganizante tiun manifestacion ni ne antaŭsciis, kian eĥon ĝi renkontos. Ĉu nur kelkaj personoj deziros renkontiĝi por sin lingve perfektigi ? Aŭ ĉu ili venos multnombre ? Tiu unua eksperimento pruvis, ke multas la esperantistoj, kiuj deziras partopreni similan studsemajnfino, sen tio ili ne estus venintaj tiom multnombre. Malofte esperantista manifestacio grupigis tiom da partoprenantoj en Svislando.

A.- De nun simila Kultura Semajnfino Esperantista okazos ĉiujare en tiu sama ideala kongresejo. La venonta renkontiĝo disvolviĝos je la 13-a kaj 14-a de majo 1972.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni anoncos al vi, kiu gajnis la esperanto-konkurson de Svisa Radio. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-